




Boletín

nº 382 febrero/abril

Zamenhof en loteri-bileto



<p><i>L. L. Zamenhof</i> <i>creador del esperanto</i></p> <p>precursor en la creación de un mundo para todos</p>		<p>2008 Año Internacional de los Idiomas</p>	<p>ONCE</p> 
<p>17 MAY. 08</p>		<p>1,50€</p>	

Asociación de utilidad pública

Boletín

Bulteno de Hispana Esperanto-Federacio
Aperanta de 1949
Numero 382 (februaro-aprilo 2008)

Prezento



Saluton denove!

Jen alvenas la nova numero de Boletín, kun malfruo, tamen feliĉe troviĝas bonaj novaĵoj rilate ĉefe la diskonigon de esperanto. La plej grava estas, kiel vi ĉiuj povis vidi en la kovrilpaĝo, la loteri-bileto dediĉita al dr-o Zamenhof. Ankaŭ tre pozitivan krom-efikon havis la ekspozicio en Madrido (p.11) , kiu taŭgis kiel “preteksto” por ke diversaj amas-komunikiloj (radio, ĵurnaloj kaj televido) prezentu nian lingvon.

Vi ankaŭ povas legi pri la daŭrigo de nia projekto “ Lingvoj, trezoro de la homaro, ilo por dialogo” kaj la ĉi-jarajn instituciajn eventojn ĉirkaŭ tiu temo.

Ni raportas ankaŭ pri la jam tradicia Iberia Renkontiĝo, ĉi-jare en Benicàssim, kaj alia en Valdepeñas.

Fine vi trovos abundan informon por la venonta Hispana Kongreso: la bunta programo, aliĉo kaj gastado. Tie okazos nia Eksterordinara Ĝenerala Kunsido, kun renovigo de la estraro. Nun estas bona tempo aliĉi por ke vi certigu ke estas loko en la gastejo.

Plazaan legadon!

Ĉefredaktanto:

Jorge Pavón

Kunlaboris:

Antonio del Barrio, Augusto Casquero, Arturo Jiménez, Li Jianhua, Ana Manero, Raul Martínez, Alejandro Pareja (korektado), Miguel Ángel Sancho, Lupe Sanz, M. Rafaela Uruña



bulteno(ĉe)esperanto.es
Calle Juliana n^o4
El Escorial (Madrid) 28280

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la respektivaj aŭtoroj.

*La redaktisto rajtas rifuzi nepetitajn artikolojn

*Estas permesite republikigi la enhavon menciante la fonton kaj sciiginte la redakcion

Hispana Esperanto Federacio
Federación Española de Esperanto
Rodríguez San Pedro 13, 3^o, 7;
ES-28015 Madrid
admin(ĉe)esperanto.es
Tel (34) 914468079
Konto ĉe BBVA:
0182-1252-31-0204011961

Estraro

Prezidanto: Augusto Casquero

Vicprezidanto: Lupe Sanz

Sekretario : Carmen Suárez

Kasisto : Pedro Garrote

Voĉdonantoj : José María Galofré,

Prezento.....	1
Convocatoria a la Asamblea General Extraordinaria.....	2
Asamblea General Extraordinaria.....	3
Zamenhof en loteri-bileto.....	3
Demisie.....	3
Estrarkunveno de HEF 2006-11-27.....	4
Kiel marĉas la projekto?.....	6
Nia paŝaro en la Reto.....	8
Ni estas publikutila asocio, sed kion signifas tio?.....	10
Biblioteka Esperanto- Ekspozicio en Madrido.....	11
Prelego en Madrido.....	15
Amikoj en Vin-lando.....	16
Iberia Renkontiĝo 2008.....	19
2008, Internacia Jaro de Lingvoj.....	20
Biografio pri Zamenhof en la Reto.....	22
Du kandidatoj por Nobel-premio.....	23
Simpozio pri lingvaj rajtoj.....	24
Internacia Esperanto-Semajno en Preparo.....	26
Tertremo en Āinio (foto).....	27
Grava subvencio por EEU.....	27
Fernando de Diego, protagonisto.....	27
Mallonge.....	27
Novaj interretaj servoj en Āinio.....	27
Kongreso 2008.....	30

Convocatoria de Asamblea General Ordinaria

En conformidad con nuestro estatuto, el Presidente de la Federación Española de Esperanto convoca a todos los socios a la Asamblea General Ordinaria que se celebrara en El Centro Cultural Aguirre de Cuenca, el sábado 5 de julio a las 9,30 horas, dentro del programa del Congreso Español de Esperanto, con el siguiente orden del día:

- 1.- Aprobación del acta de la Asamblea anterior
- 2.- Informe sobre los socios
- 3.- Comentarios sobre el ejercicio económico y el programa de actividades para 2007
- 4.- Renovación de la Directiva
- 5.- Ruegos, preguntas y propuestas.

Augusto Casquero

Asamblea General Extraordinaria 28 de febrero

El día 25 de febrero de 2008 a las 18:30, en la sede de la asociación se celebró la Asamblea General Extraordinaria de la Federación Española de Esperanto con el siguiente orden del día:

2.- Cuentas del ejercicio 2007. Las cuentas presentadas y publicadas en “Boletín” nº 381 fueron aprobadas por unanimidad.

3.- Memoria de actividades de 2007. La memoria de actividades de 2007 publicada en el “Boletín” nº 381 fue aprobada por unanimidad

3.- Ruegos y preguntas.

Al no haber ninguna cuestión más que tratar el Presidente cierra la sesión a las 19,00 horas.

C. Suárez (Secretaria)

A. Casquero (Presidente)

Zamenhof en loteri-bileto

Demisie

La 12an de majo, ONCE (Nacia organizaĵo de blinduloj) disvendis loterian kuponon dediĉitan al Zamenhof pere de siaj 20.000 vendistoj. Akompanas la bildon la frazo “Precursor en la creaci3n de un mundo para todos”; (pioniro en la kreado de mondo por 3iuj). Ni devas dankin nian membron Pedro Zurita pro liaj klopodoj kontaktante ONCE. Trovi3as ankaŭ mencio pri la Internacia Jaro de la lingvoj. Do, bona maniero ke grava kvanto da homoj rememoru pri nia lingvo.



Kiel redaktisto de 3i tiu bulteno mi anoncas mian demision, efektivi3onta, maksimume, post la redaktado de la numero post-kongresa. Diversaj postuloj en mia vivo igas neebla garanti3i akuratan aperon de la bulteno kaj la kvaliton kiun mi volas por 3i. Kvankam mi povus daŭrigi, mi kredas ke tiu 3an3o pli konvenas al HEF. Estis granda sperto labori en 3i tiu posteno. Mi dankas 3iujn kiuj helpis kaj apogis tiun gravan servon de HEF, kiu kune kun la ret-pa3o estas esenca por diskonigi nian aktivadon. La nova 3efredaktisto (aŭ skipo, kio estas preferinda) havos mian subtenon kaj helpon. Sukceson!

Jorge Pav3n

Estrarkunveno de HEF 2008-02-25

Æeestis la estraranoj Lupe Sanz, Augusto Casquero (per Skype), Jorge Pavón kaj la ne-estraranoj: Alejandro Pareja, Manolo Parra, Iturrioz (per Skype), J. Francisco; Angelita Sanz, kaj Pedro Zurita

1. Kontoj

➤ Oni aprobas renoviøon de la bank-depono je 18.000 eýroj.

➤ La Estraro aprobas proponi al la Øenerala Kunsido de Cuenca al Rayl Martínez Anguita kiel nova estrarano (librotenisto).

➤ Oni akceptas doni 150 eýrojn por la organizado de la Iberia Renkontiøo (IR-08) en Benicàssim kondiæ ke la organizanto prezentos oficialan fakturon je la nomo de HEF.

1. Kontoj

➤ Kongresejo: Centro Cultural "Escuelas Aguirre" (granda salono) kaj ankaý loøejo.

➤ Loøejo: Universitata restadejo "Bartolomé Cossío" 60 litoj (æambroj: unu-, du- aý trilitaj) Plengaste ekde la tag-manøo de la 1aýdo 3-a øis la tagmanøo de la dimanøo 6-a. Entute 80 eýroj. Oni devas nepre pagi 80 eurojn æ se la æambro ne estos okupita æiujn tagojn. La æambroj estos donita laý la dato de la pago al la bank-konto de la Kongreso.

➤ Programo: Konfirmis sian partoprenon kiel prelegantoj aý aliaj: Miguel Fernández. Augusto Casquero, Toño del Barrio, Ana Manero, Miguel Angel Sanæo, Pedro Hernández kaj José Antonio Vergara.

3. Sekretario

➤ Kiel rezulto de la peto de DNI pere de la forumo hef-anaro, la Federacio regajnis kelkajn membrojn kiuj ðuldas siajn kotizojn

➤ Jam estas registritaj en "Registro Mercantil" la novaj folioj por la elektronika protokol-libro.

➤ Nur por esplori la koston oni petis buøeton al "Kukuxumuxu" por 300 T-æemizojn: jen la rezulto: koloraj 1.419 + iva (po 5 eýroj). Se HEF atingos subvencion oni povas fari ilin kiel propagandilo.

➤ Æefdelegito de UEA en Hispanio: Post la demisio de Fernando Moral neniu el la hispanaj delegitoj ofertis sin por la posteno. Pro tio, Osmo Buller, kiel øenerala direktoro de UEA, plenumos la funkcion øis HEF anoncos novan æefdelegiton kaj la estraro de UEA aprobas lian/þian elekton.

➤ S-ro Buller, kiel Hispana Æefdelegito, akceptis kiel novan delegiton kaj fakan delegiton en Zaragozo al Enrique Navarro Rubio.

3. Boletín

➤ La numero 381 alvenos æe la membroj post kelkaj tagoj. La numero 382 estos preta por la presejo je la komenco de aprilo.

➤ Enhavo: protokolo de la Eksterordinara Øenerala Kunsido, kaj resumo de la estrar-kunsido, subvencio al IRo-08, alvoko por la Øenerala Kunsido en Cuenca, Projekto 2008, partopreno en Iro-08, provizora programo de la Kongreso.

➤ Lupe petas al la redaktoro ke li sendu al þi la “oficialajn tekstojn” por revizio.

5. Projekto 2008

➤ De la 11a de februaro øis la 8a de marto: HEF, kune kun Madrida Esperanto-Liceo organizas ekspozicion de E-Libro en Centro Comercial de Hortaleza (Madrid). La kontaktoj de Lupe, la bonega organizado de la evento pere de Ana kaj la helpo de diversaj volontuloj por deþori en la stando faris sukcesan ekspozicion. La laboro jam estas farita kaj je la dispono de alia E-Grupoj por fari similan eventon en sia urboj.

➤ La 17an de aprilo estis organizita prelego en Casa de Guadalajara “El esperanto en el año internacional de las lenguas” fare de Toño del Barrio

➤ La traduko hispanen de la verko “La

zamenhofa strato” estas farata de Iturrioz, Chema Rodríguez kaj Á. Arquillos. La eldono de la libro dependas de la atingo de la subvencio.

➤ La kupono de ONCE pri Zamenhof aperos la sabaton 17-an de majo 2008 dank’al Pedro Zurita kiu parolis kun respondeculo kaj ili rekonsideris la peton kiu estis neita.

➤ Por Feria del Libro de Castilla –La Mancha en Cuenca. Alejandro ne trovis volontulojn por deþori dum unu semajno.

➤ Pri la libro pri “E-historio en Bizkajo” Iturrioz petis subvencion al la Bizkaja Deputitaro. Li havas buøeton de presejo de Bilbao: iom pli ol 3.700 eýroj.

6. Demandoj kaj proponoj

➤ Adúriz portos al Madrido la grandan afiþon farita por la Kongreso de Bilbao. HEF pagos al Eýropa E-Unio po 0,5 eýrojn por membro. (262 membroj x 0,50 = 131 eýrojn).

➤ Oni akordas havi en la konto de HEF æe UEA, post la pago de kotizoj, ne pli ol 250 eýrojn.

7. Venonta kunveno

12an de majo en la sidejo de HEF je la 18,00 horo

Kiel marpas la projekto?

En pasintaj numeroj ni jam parolis pri la projekto “Lingvoj, trezoro de la homaro, ilo por dialogo” kiun ni pretigis por celebri la “Internacian Jaron de la Lingvoj”, kiu koincidas kun la “Eýropa Jaro de la Interkultura Dialogo”, kaj por kunmemori la 100-an datrevenon de la kreado de Universala Esperanto-Asocio.

En tiu æi numero vi legos, en diversaj artikoloj, novaĵojn pri la diversaj agadoj kiuj jam disvolviĝis aý estas planataj por la cetero de la jaro. Kiel resumo, ni diru ke la agadoj jam ekis, kaj ke la rezulto estas sufiæe kontentiga. Ni eæ povus diri ke nia agado estas la øis nun plej videbla iniciato rilate al la Internacia Jaro, kiu øis nun apenaý estas atentata de la oficialaj instancoj kaj la amas-komunikiloj.

La publika agado de nia asocio estis øis nun kontentige videbla, se ni konsideras la modeston de niaj fortoj. La retejo de HEF entenas jam tre vizitindan apartaĵon pri la Projekto, kiun pretigis Miguel Ángel Sancho, kun la helpo de grupeto da volontuloj. Vi povas viziti øin en <http://www.esperanto.es/proyecto08> en la hispana, kaj <http://www.esperanto.es/projekto08> en Esperanto. Øi estas ligita de diversaj aliaj retpaøoj, kaj ni esperas ke øi fariøos unu el la æefaj informiloj pri la Internacia Jaro en Hispanio. La oficiala publika prezentado okazis la

17-an de aprilo, en Casa de Guadalajara de Madrido. Pri øi vi povas legi en aparta artikolo.

Sed plej sukcesa agado jam estis okazinta antaýe: temas pri la ekspozicio “Esperanto: el la individua al la kolektiva kreado”, kiu disvolviĝis en komerca centro de Madrido. Ankaý pri øi kaj pri øia gazetara eýlo legu aparte. Mi nun volas emfazi ke la aranøon kaj dezajnon (pri kiu la kredito devas iri æefe al Ana Manero) eblas uzi por similaj okazoj en aliaj lokoj kaj urboj, kaj mi devas kuraøigi la aktivulajn legantojn por ke oni kontaktu privatajn aý publikajn ejojn, en kiuj similaj ekspozicioj povas esti aranøataj. Necesas nur sekuraj vitroprankoj kaj iomete da laboro por bele montri la kulturon de nia lingvo.

Same sukcesa kaj same frapa estos alia agado: la uzo de la bildo de Zamenhof, la nomo de nia lingvo kaj la aludo al la Internacia Jaro de Lingvoj por ornami loteribiletan (“cupón”) de la Nacia Organizo de Hispanaj Blinduloj, la ONCE. La demarøoj kiuj kondukis al la sukceso de la iniciato estis entreprenitaj de Pedro Zurita, kiu trafe trovis la vojon por konvinki la gvidantojn de la organizo.

Dume, marpas laýplanite la organizado de la kongreso, sub la gvido de Alejandro Pareja, kies æeftemo estos ankaý la Internacia Jaro, emfazante la

rolon de lingvoj por la kultura riæeco de la mondo kaj la komunikado trans baroj. Pri tio denove legu aparte. Diversaj iniciatoj tamen prokrastiøos aý entute ne okazos. Probable, la lasta estos la rezulto de la demarŝoj por partopreni per budo la madridan Librofoiron, malgraý la penoj entreprenitaj æefe de Juan del Castillo. Ni ankoraý havas fortajn esperojn pri la publikigo de libroj. Ni ankoraý ne povas konkretigi la rezulton dum tiu æi jaro, kiu krome dependos de la ebla akiro de tiucelaj subvencioj. Ni ankaý konsideru ke parton de la laboro ni lasos por venonta 2009, okaze de la 150-jariøo de la nasko de D-ro Zamenhof.

Fine, ni devas komenti la institucian flankon. Ni kontaktis kun diversaj oficialaj instancoj, por prezenti niajn iniciatojn, kaj ankaý petis subvenciojn al la Ministerio de Kulturo, kiu rifuzis øin. Kiel dirite en la komenco, la Internacia Jaro de la Lingvoj paþas nerimarkate en Hispanio øis nun. Nur iuj aýtonomaj registaroj montris intereson pri la afero. Sed nek la Ministerio pri Eksteraj Aferoj (je kiu dependas la rilatoj kun Unuiøintaj Nacioj) nek tiu de Kulturo entreprenis ian iniciaton. La Eýropa Jaro por Interkultura Dialogo ja estas pli atentata, kaj jam prezentita oficiale. Sed ni sukcesis ke nia projekto aperu en la retaj portaloj de Unesko, de la Eýropa Unio kaj de la hispana Ministerio de Kulturo. Povus ja okazi ke spite de nia modesteco, estos øuste la agado de la

esperantista movado kiu vekos la atenton pri tiuj æi celebradoj en nia lando.

Sed ni ne tro atendu de la oficialaj instancoj. Nur nia laboro kaj nia iniciatemo povas sukcesigi niajn celojn. Tial, permesu ke mi ankoraýfoje faru alvokon por via partopreno. Jam diversaj homoj laboris super æiuj æi iniciatoj. Vi certe jam rimarkis ke en la antaýaj paragrafoj mi citis la nomojn de diversaj homoj kiuj havas rolon en kelkaj tiuj agadoj. Tio havas la riskon ke pluraj aliaj ne estis menciitaj, el kiuj mi nun devas speciale noti la vicprezidanton de HEF, Lupe Sanz, kiu gvidis grandan parton de la laboro kaj spronis nin æiujn al la serioza laborado. Mi ne forgesas la ceterajn (mi scias ke ili pardonos min), sed mi notis kelkajn nomojn por pruvi ke ne iu "HEF" abstrakta antaýenigas la aktivadojn, sed homoj konkretaj. Se vi mem deziras kunlabori, havas ideojn por agadoj aý deziras partopreni la jam anoncitajn, ne hezitu kontakti nin.

Restas ankoraý ok monatoj, kaj multaj planoj farendaj. Æar, kiel diris neesperantista aktivulo al kiu ni informis pri niaj planoj, "se esperantistoj ne profitas la Internacian Jaron de la Lingvoj por konigi sin, kiam ili povos tion fari?"

Antonio del Barrio

Nia paŝaro en la Reto

De antaŭ longe oni petas de mi priskribi la laboron kaj celojn de nia paŝaro. Mia ĝiama manko de tempo ĝiam malebligis al mi tion fari. Tamen, ĉe se telegrafie, jen mallonga artikolo, kiu espereble pensigos vin pri la graveco de la laboro de HEF en la Reto.

Per sia retpaŝaro, HEF strebas, resume, al jeno:

➤ Doni al ĵurnalistoj, reserĉistoj kaj interesitoj plenajn kaj kvalitatajn informojn pri Esperanto el lingva kaj socia vidpunktoj. Ankaŭ pri ĝia kulturo, la organizado de ĝia movado kaj ĝiaj historio kaj aktuala. Ni celas per tio krei favoran opinion pri nia lingvo kaj movado.

➤ Faciligigi komencajn konojn kaj lernilojn al estontaj parolantoj de la lingvo per aliro al ĝeestaj, distaj kaj retaj kursoj, kaj elmontri la kulturajn profitojn akireblajn per ĝia uzado. Ni celas per tio trovi novajn parolantojn kaj aktivulojn.

➤ Diponigi informojn pri la movado al hispanlingvaj esperantistoj, ĉefe en nia lando, sed ne nur en ĝi. Ni celas per tio krei utilon al esperantistoj.

Ĝion ĝi ni povos atingi nur se la tutan laboron ni faras laŭ jenaj kondiĉoj:

➤ Disponigi nur verajn kaj ĝustajn datumojn.

➤ Doni kompletajn kaj klarajn informojn.

➤ Allogi kaj ne tedi, per la enhavo kaj la aspekto.

➤ Celi ne nur esperantistojn, sed ĉefe ĝeneralan publikon.

➤ Klopodi uzi ĝiujn rimedojn por esti alireblaj de ĝiuj uzantoj.

➤ Profiti la novajn teknikajn eblojn aŭ tendencojn en la Reto.

Ekde la akiro de nia aktuala reta nomo "esperanto.es", ni disvolvas projekton, ankoraŭ ne finitan, en la kadro de la supre menciitaj kondiĉoj kaj celoj. Por tio ni elektis ĝenerale uzatan sistemon por mastrumado kaj publikigo de ret-dokumentoj. Per ĝi eblis unufoje disdividi la laboron inter pluraj neteknikaj kunlaborantoj.

Tiu teamo konstruis la novan paŝaron laŭ tri fazoj. En la unua ni simple prenis ĝiujn disponeblajn dokumentojn kaj "purigis" ilin el superflua kaj ĝenanta "html-kodo", tiel ke ĝi ne plu enhavas ajnan antaŭjuĝon pri ĝia eventuala aspekto. En la dua, ni reorganizis la dokumentojn laŭ nova menuo-strukturo, pensita el la vidpunkto de niaj eventualaj uzantoj, kaj kun speciala zorgo, ke ĝi plenumu la atingon de niaj celoj.

Teknike ni muntis profesian dezajnon kaj programon, per kiu ni povas garantii la aliron al la paŝaro per la lastaj versioj de la plej konataj esploriloj, kaj plifaciligi ĝian uzadon al handikapitaj personoj.

Ni laboras nun en la tria fazo, kies finon ni ankoraŭ ne antaŭvidas, pri polurado de la enhavo kaj strukturo, kaj aldono de novaj servoj (ekzemple, la biblioteko)

Rezulte de ĝio ĝi, nia paŝaro atingis nivelon, tute ne kongruan kun la grandeco de nia asocio, tiel ke ni povas konkurenci en la Reto kun aliaj organizoj pli grandaj, kiuj dediĝas grandajn financajn kaj homajn rimedojn al la konstruado de siaj retejoj.

Tiu rezulto estas evidenta de kiam komenciĝis nia aventuro per tiu nova sistemo kaj la aktuala nomo, kaj la evoluo de la uzo de nia paŝaro estas konstante pozitiva. El komenca monata averaĝo de 142 vizitoj en januaro de 2007 ni kreskis al pli ol 450 nuntempe.

Komencaj mezuroj per la konata sistemo "Google Analytics" montras tre elstarajn ciferojn kiel startpunkto ĝijara. Ĝiu vizitanto restas en nia paŝaro averaĝe 6 minutoj. Nur 32% el ili tuj foriras pro erara alveno. La nomo ja estas klara sukceso ĝar 74% el la vizitantoj eniras rekte, 16,5% venas el serĉiloj kaj cetera 9,27%, eniris

pere de ligoj en aliaj paĝoj.

Ni havas vizitantojn el 53 landoj, ĝefe hispanlingvaj. Niaj naciaj uzantoj venas el 95 urboj, ĝefe, laŭorde, el la Madrida Komunumo, Valencio, Katalunio kaj Andaluzio.

Sed ni estas konsciaj ke, kvankam la jam dekjara penado de HEF pri la Reto, ni komencis nur marŝi kaj la vojo estas longa. Klare videblas, ke la Reto sendube fariĝos la sola vojo, kiun povos trairi esperantaj organizoj por diskonigi Esperanton, kaj ĝuste pro tio ni pretigas la daŭrigon de la projekto por la venontaj jaroj.

El niaj planoj elstaras poluri la redaktadon de niaj dokumentoj far profesia ĵurnalisto kaj mendi kompletigon de ĝia strukturo al eksperta fakulo pri retdokumentoj. Nun ni kompletigas nian laboron rilate al la Biblioteko Juan Régulo Pérez, kaj daŭre strebas al plibonigo de la alirebleco de nia paŝaro por handikapuloj.

Ni bezonas vian helpon, ĝar ĝi tiu penado estas fundamento de nia estonteco. La paŝaro de HEF estas esenca ilo por ekstera informado, eble la sola kiun ni povas regi sendepende. Ideoj, kaj ĝefe kunlaboro, estas bonvenaj.

Miguel A. Sancho

Ni estas publikutila asocio, sed kion signifas tio?

Sendube multaj el vi iam demandis pri tio ĉi, kiam vi vidis tiun ĉi nomumon en kia ajn reklamaĵo aŭ dokumento de HEF, tamen oni malmulte konscias pri la respondeco kaj laboro, kiujn nomumo pri "publikutileco" kunportas.

Unue oni klarigu, ke la nomumo pri publikutileco estas tute ne arbitra afero nek nur reklameca. Kvankam la anoj de asocio opiniu ĉin ege interesa, nur la asocioj tiel nomumitaj de la Ministerio pri Enlandaj Aferoj povas uzi ĉin, laŭ kondiĉaro.

Nia Konstitucio kaj la leĝaro, kiu envolvas ĉin ekde ties naskiĝo, protektas kaj stimulas la rajton asociiĝi kiel nepra rimedo por ke la civitanoj interŝanĝu siajn apartajn interesojn, faciligante tiel la plenumadon kaj sekve la antaŭeniron de la tuta socio rilate al tiu konkreta fako. Nu, pere de la forto kaj reprezenteco, kiujn alportas unueco kaj proparolanteco por la individuaj intereso, asocioj povas esti taŭga rimedo por, ke tiel, kiel la 9-a artikolo de nia Konstitucio diras, la civitanoj partoprenu en la ekonomia, politika, socia kaj kultura sferoj de nia lando.

Agnoskite tiu ĉi grava rolo, la leĝoj apenaŭ limigas la liberon pri asociiĝo, nek taksas ties celojn, malpermesante nur tiujn, kies naturo estas sekreta aŭ paramilitista samkiel tiujn, kiuj celas deliktulojn. Do, povas

ekzisti asocioj por kio ajn, tiom da ili kiom la intereso de la civitanoj.

Kompreneble, respektante la legitimecon de ĉiuj ĉi asocioj, la ŝtato volas protekti kaj stimuli la kreadon de tiuj, kies celo(j) kongruas kun la principoj verkitaj en la Konstitucio, kiel la protekto al infanaro aŭ al natura medio, la stimulado de toleremo, egaleco, Homaj Rajtoj, kulturo, la civitanaj, edukaj aŭ demokratiaj principoj, ktp. Do, se krom tiuj ĉi celoj, ili estas sendependaj laŭ ties funkciado kaj publikaj al la tuta socio (ne nur al siaj asocioj) laŭ ties aktiveco, tiaj asocioj povas havigi al si la nomumon "Publikutila Asocio".

Por tio realigi, la Ministerio pri Enlandaj Aferoj ofertas tiucelajn monhelpon kaj subvenciojn krom apartan protekton. Sed kontraŭpage, ĉi postulas el la asocioj kelkajn formkondiĉojn multe pli severajn ol tiuj de la ceteraj asocioj. Krom kontroli ties statutojn kaj la necesaj klopodoj por enskribiĝi en specifa registro, la publikutilaj asocioj devas ĉiujare prezenti dosierojn pri aktivaĵoj kaj konteltirojn sur oficiala formularo aparte ĉioampleksa. Cetere, oni devas prezenti konkretajn fincibilancojn -pri kiuj la ceteraj nelukraj asocioj estas liberaj-, kaj ankaŭ esti zorgemaj pri arkivado de fakturoj kaj dokumentoj ricevitaĵoj aŭ senditaĵoj.

al paĝo 14 →

Bibliografia Esperanto-Ekspozicio en Madrido

De la 11a de februaro ĝis la 8a de marto eblis viziti en la komerca centro Gran Vía de Hortaleza de Madrid, la bibliografian ekspozicion *Esperanto, de la creación individual a la creación colectiva 1*. Ĝin organizis Hispana Esperanto-Federacio (HEF), kadre de sia pli ĝenerala projekto *Lingvoj, trezoro de la homaro, ilo por dialogo 2* kiu disvolviĝos dum 2008 kaj 2009 por celebri la *Internacian Jaron de la Lingvoj*, la *Eŭropan Jaron de la Interkultura Dialogo* kaj por soleni la *100-an datrevenon de Universala Esperanto-Asocio*.



HEF kreis specifan afiŝon por la evento

La elektitaj libroj montris kiel iu persona projekto, la individua kreaĵo de Zamenhof, iĝis tutmonda kultura

movado danke al la kolektiva laboro de beletristoj kaj parolantoj de la lingvo. La ekspozicio celis esti samtempe distra kaj instrua, tial, krom la librojn kaj ties bibliografiajn referaĵojn, la vizitantoj trovis en la vitrinoj ankaŭ tekstetojn kun koncernaj informoj pri la lingvo kaj ĝia kulturo.



Tri el la aŭtoroj: (de maldekstro) Miguel Ángel Sancho, Juan Trenado kaj Darío Rodríguez

Ĝio organiziĝis laŭ tri aksoj:

1. *La individua kreado: Zamenhof, iniciatinto de esperanto.* Ĝi tie oni montris librojn kaj alispecan materialon pri Zamenhof kaj la originoj de la lingvo: biografioj, fotoj, la Fundamento de Esperanto, ktp..

2. *La kolektiva kreado: literaturo, evoluiĝo de la lingvo.* Ĝi branĉo

1. Esperanto de la individua al la kolektiva kreado
2. www.esperanto.es/projekto

reliefiĝis la gravecon de literaturo en la evoluo de esperanto ĉis plena maturiĝo, tial la montritaj libroj kovris panoramon de la unuaj tradukoj de Zamenhof ĉis la nunaj tendencoj kun aparta insisto super niaj klasikuloj. Krome, ĉi tie havis lokon la literaturo tradukita -el la hispana kaj aliaj lingvoj-, la originala literaturo, la literaturo por infanoj kaj junuloj, la sciencfikciaj verkoj kaj la eseoj.

3. *La kolektiva kreado: esperanto-parolantoj, foruloj de kulturo.* Vera enradikiĝo de la lingvo ĉuldiĝas, tamen, al ties parolantoj, kaj tio montriĝis en la tria fako de la ekspozicio. Vizitantoj vidis ĉi tie ampleksan kolekton de revuoj kaj diskoj, kaj eldonitaĵoj de la plej gravaj esperanto-institucioj, ĉefe de UEA, pri kies ĉjaraj centjariĝo kaj kandidatiĝo al Nobel Premio pri Paco ni ankaŭ informis. Fine, kelkaj kuriozaĵoj: esperanto en kino kaj libro en brajlo, kaj areto de lernolibroj kaj vortaroj.



Diversaj lernolibroj kaj vortaroj

Sabate tuttage kaj vendrede vespere, funkciis en la komerca centro

informangulo zorgata de esperantistoj, kie eblis aŝskulti muzikon, ĉeti lernolibrojn kaj ricevi la unuajn lingvonociojn. Ni taksas la kunlaboron kun la komerca centro tre profita ĉar ĉi ne nur ebligis la muntadon de ekspozicio kaj budo, sed ankaŭ pagis la diversajn informilojn, kies kosto atingis la ciferon de 1000 eŭroj. Krome, ĉiutage ili disaŝdigis muzikon en esperanto en difinitaj momentoj de la tago.



Montrado de KD-oj

La samaj aktivuloj faras nun la oportunajn demarĉojn por munti la ekspozicion en aliaj madridaj lokoj. HEF metas la dokumentojn redaktitajn por ĉi ekspozicio je la dispo de grupoj kaj aktivuloj, kiuj deziras fari similan aktivaĵon kie ajn. Kiel orientigo, eblas konsulti la titolojn montritajn dum ĉi ekspozicio, sed vidu, ke ajna materialo el la listo povas esti anstataŭata de alia disponebla ĉiukaze. ĉio supre menciita estas deŭtebla en pdf-formato el la paĉaro. Je la dispo de la grupoj estas ankaŭ modelo de

dokumento por prezenti ekspozician projekton al la koncernaj autoritatoj. ĉi lastan petu rekte de la biblioteka prizorganto⁴. Nu, kiel vi jam divenis, temas ĉefe pri tio, profiti la loke disponeblan materialon (foje multe pli interesa ol ni pensas), elprankigi kaj montri ĉin en konvena loko.



El la kolekto "Hispana literaturo"

La ekspozicion organizis Ana Manero, prizorganto de Biblioteko Juan Régulo Pérez². La montritaj libroj apartenas plejparte al tiu biblioteko sed ankaŭ estas multaj ekzempleroj el la kolekto de Esperanto-Liceo de Madrid. La informoj sur la aĵoj ĉerpiĝis ĉefe el la libro de Antonio Valén, *El esperanto: lengua y cultura*. Menciindas ankaŭ aliaj gravaj fontoj kiel la paĝaro de HEF³ kaj Vikipedio⁴

Kunordigado de la buda aktivado buldiĝas al Lupe Sanz, vicprezidanto

1. kontaktebla per biblioteko(ĉe)esperanto.es

2. <http://www.esperanto.es/biblioteko>

3. <http://www.esperanto.es>

4. <http://eo.wikipedia.org>

de HEF, kiu ankaŭ responsas pri la iniciato kontakti la komercan centron. Aparte dankindas la deklorantoj ĉe la budo kaj ĉiuj aliaj, kies pli nevidebla laboro, tamen tute ne malpli grava, ebligis la sukceson de ĉi agado.

Amaskomunikile


La aktivado tiris la atenton de amaskomunikiloj kaj rezulte de tio oni radie intervjuis plurfoje la direktoron de *Fundación Esperanto*, Toño del Barrio. Inter la radio-elsendoj menciindas la tutnacia *M-80*, en la humura kaj muzika programo *No somos nadie* la 4an de marto je la 9:25 matene; *Radio Intercontinental*, samtage je la 17:50 horo en konvencia intervjuo programo; *Onda Madrid*, la 15an de februaro je la 18:50 horo en vespera programo pri kulturo; kaj *Top Radio*, la 19an de februaro, je la 20:30 en muzika programo ĉefe por latinamerikaj enmigrintoj.

Televido (*TVE2*) faris iom pli ol du minutan raporton (vidu fotojn) pri Esperanto, kiu elsendiĝis la nokton de la 17a al la 18a de marto je la 00:35 horo dum la informilo *Noticias*. En ĉi la prezentisto enkondukas la temon en Esperanto, kun subtitoloj en la hispana. Poste parolas Roger Borges, brazila esperantisto, kaj Jorge Camacho, ambaŭ ankaŭ en Esperanto kun

subtitoloj. Kaj fine oni prezentas bildojn de la 1/8s okazinta ekspozicio.



Roger Borges en TVE2, brazila esperantisto loanta en Madrid, dancigas homojn en la tuta mondo.



La poeto Jorge Camacho. Ambaŭ intervjuetoj spekteblas ĉe youtube.com serĉante per la vortoj “esperanto hispana televido”

Ankaŭ diversaj ĵurnaloj interesiĝis pri la afero. Inter la paperaj menciindas *Tribuna Universitaria* (Salamanca) N° 485, 18-2-2008 (tutpaŝa raporto), *ABC*, 22-2-2008 (mallonga informeto) kaj *20*

minutos, 20-2-2008 (recenzo); kaj inter la ciferecaj, *El País digital* (27-2-2008, recenzo en la aĉfpaŝo), *Mi literaturas!* (27-02-2008, ampleksa recenzo), *El Distrito.es* (27-02-2008, ampleksa recenzo), *LaNetro.com* (27-2-2008, recenzo), *Munimadrid.es* (27-02-2008, recenzo), kaj *MadridDiario.es*, distrito Hortaleza, (15-2-2008, ampleksa recenzo).

Ana Manero

(de paŝo 10)

Tio ĉi devigas nin teni saman librotendon kiel tiun de komercaj entreprenoj, noti ĉin sur specifaj formularoj kaj prezenti tiun por kontrolado ene de tre striktaj limtempoj, ĉar dependas de tiu ĉi plenumado la donon de l' monhelpo ofertata de l' institucioj.

Tiuj ĉi lastaj kondiĉoj devigas nian asocion konstante kaj diligente labori sub tia respondeco, ke per tiuj ĉi linioj mi volas danki al ĉiuj partoprenantaj homoj, ĉar dank' al ilia laboro, ni povas ĉui la protekton, subvenciojn kaj publikecon -tiom pozitivajn-, kiujn publikutileco kunportas.

Raul Martínez

Prelego en Madrido

La 17an Aprilo, Toño del Barrio prelegis hispanlingve en Casa de Guadalajara en Madrido pri "Esperanto en la Internacia Jaro de la Lingvoj".

Li eksplikis al la aŭdantaro, helpata per komputilaj projekcioj, la bazan strukturon de nia lingvo kaj ĝian ampleksan uzon en literaturo, muziko, interreto ktp. Poste li referencis al la partopreno de niaj esperantaj asocioj en eventoj kiaj la Internacia Jaro de la Lingvoj kaj la Eŭropa Jaro de la Interkultura Dialogo.

Li detale parolis pri la Projekto de HEF 2008/2009, kiu kadre de la Internacia Jaro de la Lingvoj celebras la 100an datrevenon de la fondo de UEA kaj la 150an datrevenon de la naskiĝo de Zamenhof. Tiurilate li informis pri la jam sukcese okazinta Bibliografia Esperanto-Ekspozicio en grava madrida komerca centro, en la kadro de tiu Projekto, aldonante ke HEF celas ke similaj eventoj okazu en aliaj hispanaj urboj. Konkrete li menciis la venontan kongreson en Cuenca kiu speciale emfazos la rolon de Esperanto en la Internacia Jaro de la Lingvoj. Li informis pri grava evento organizita de UEA en la sidejo de Unuiĝintaj Nacioj, kiu okazos en Ĝenevo, Svisio, la 24an Aprilo, nome "Simpozio pri Lingvaj Rajtoj en la Mondo", kun partopreno de elstaraj lingvistoj.



En la podio, Toño del Barrio troviĝas apud reprezentanto de la institucio, kiu faris la enkondukon

Fine de la prelego, Toño projekciis filmeton enhavantan la raporton kiun la hispana televido TVE2 emisiis okaze de la Bibliografia Ekspozicio kaj alian pri ĉarma bebo esperanto-parolanta por montri ke Esperanto povas funkcii kiel denaska lingvo.

La publiko multe interesiĝis kaj faris plurajn demandojn al la preleginto. Sukcesa evento dank' al la preleginto kaj al Lupe Sanz, kiu organizis ĝin.

Esperanto-Liceo de Madrid



Libroservo Luis Serrano

Apartado 423. 08200 SABADELL
Tel. 93 727 50 21
rete: luis_serrano(æ)mixmail.com

Amikoj en Vin-lando

Ne, ne konfuziøu. Kiam mi tajpis Vin-lando mi tute ne intencis rilati al la nomo donita de vikingoj al iu mistera kontinento (æu Ameriko?). Mi nur parolas pri “la Lando de Vino”, kaj tio en Hispanio sinonimas Kastilion-Manæon.

La pasintan monaton Marto, kelkaj amikoj decidis renkontiøeti en la urbo Valdepeñas (provinco Reøurbo¹) kaj øui kune unu semajnfino, gustumante vinon, bone manøante, ekkonante la regionon de Donkiøoto kaj æefe, parolante Esperanton.

Entute ni estis 17 homoj kiuj iom post iomete ariøis; unue æe unu el la placoj de Valdepeñas. De tie ni iris en trinkejon por la aperitivo, øuste æe la sama placo, kaj poste æiuj kune ni iris en la Vinkelon de l’ Steloj (<http://www.labodegadelasestrellas.com>). En tiu ejo oni rakontis kaj klarigis al ni, kiel ili fabrikas tut-ekologiajn vinojn pere de tre tradicie kultivataj vitoj el kiuj oni rikoltas la vinberojn laŭ la fazoj de la luno kaj la steloj. Tiel la vinkelo nomiøas “de l’ Steloj”.

Por ke ni tute komprenu la procezon, oni montris al ni æiujn paøojn, kiujn la vinbersuko spertas ekde la momento de la rikoltado øis ties

Unue oni premas la vinberojn por elpremi la tutan sukcon, poste oni metas tiun sukcon en grandajn varegojn² por ke øi akiru iom da vingusto kaj ekfermentu, post tio oni povas enboteligi tiun vinon kiel “juna vino” aŭ øin transloki al grandaj bareloj el amerika aŭ franca kverkligno, kie øi plu fermentas øis la punkto esti vera “tut-korpa” vino. De tie oni povas stapli øin en aliajn barelojn malpli grandaj, ene de profunda kaj antikva kavoj sub la vinfabriko, aŭ rekte enboteligi kaj vendi øin al konsumantoj



Subtera vinkelo

Post tiu interesege kaj instrua promenado pri la procezo, oni eksplikis al ni grafike, kiel ili obeas la stelojn kaj la lunon por elekti la rikoltmomenton. Por tion fari ni eniris en blov-planetarion en kiu oni povis spekti la konstelaciojn kaj la tutan firmamenton. Nia æiæerono, helpe de kelkaj rondaj samcentraj tabuletoj,

1. Hispanie: Ciudad Real

2. Væro: granda terkruæo por teni freøa akvon aŭ vinon, konservi oleon, ktp (PIV)

montris al ni kiel kaj kial elekti tiun øustan momenton, transmitante la klarigojn sur la tabuletoj en la "grandan planetarian tublegon".

Kaj jen venis la plej øuiga momento: tiu de gustumado. Antaý ni longa kaj solida ligno-tablo kun 17 seøoj æiufanke. Centre sur tiu impona tavolo kelkaj kanapoj faritaj kun tre tipaj kaj lokaj ingredientoj. Antaý æiu seøo tri kristalglasoj, unu telereto kaj unu paper-buþtuko. Je la momento de la tria gustumado (oni gustumis 6 diversajn vinojn) duono de la æeestantaro jam drinkis. Ridoj, ridetoj, þercoj, ktp... La etoso ekamuziøas, sed la povra ææerono devis vere strebi por aýdigi siajn vortojn kaj ekspliki kiel percepti æiun nuancon en la vinoj. Tamen, ankaý li amuziøis kaj fine aliøis al "la festo".

La sperto estis vera festo da gustoj, odoroj kaj sentoj. Æiu vino po unu kanapon; kelkaj kun fromaøo kaj cidonimarmelado¹, aliaj kun fromaøo kaj pinsemoj sed æiam sur la tavolo panpecetoj kun aniz-semoj.

Pli-malpli ebriaj ni eliris el la vinfabriko kaj iris en la aýtojn por veturi al Almagro. Kompreneble nur stiris tiuj, kiuj malplej aý tute ne trinkis vinon. En tiu urbeto ni unue tagmanøis, æar la horo de nia alveno en la retoracio estis la tria!!!

La manøado estis longe-dayra

1. Hispane: (carne de) membrillo

2. Hispane: Corral de comedias

kaj amuza. Tre tipajn pladojn ili servis al ni kaj æiuj, tiel manøanoj kiel aliregianoj, øuis ties bonan guston kaj abundon. La *organizantoj* klargis, kiuj pladoj aperas en la verko "Donkiøoto de Manøo" kaj kiel oni kuiras ilin. Post la deserto venis du surprizoj: la unua kaj plej æefa, donaco de EMAS al æiu æeestanto tipa festa koltuko kun la logoo de EMAS (la esperanto-asocio de La Mancha) presita sur øi; kaj la dua estis eta resumo pri la historio de la urbeto tial ke øi kandidatiøas kiel "Homa Heredaøo" æe UNESCO.

Kompreneble estante en tiom historia urbo, ni devis øin viziti, tial ni iris en la Kurton por Teatraøoj¹ kaj spektis teatrigitan prezentadon de la ejo. Tre amuza spektaklo en kies retoj -æar øi estas interaga- falis Pablo (toledana samideano). Li (fikcie) iøis la amata musketisto de unu el la æefrolulinoj kaj de tiam oni lin nomas "La Musketisto". Foje kaj refoje la aktorino rigardis lin kaj diris amvortojn kiel "mia kavaliro", "mia musketisto" aý "kiom bela vi estas, musketisto". Ege ridiga situacio, æefe por la kunirantoj. Sed ankaý aliaj amuzaj situacioj okazis: Jen unu el ili: la plejparto de la esperantistoj sidiøis en "la cazuela", kie virinoj sidiøadis en la 17-a jarcento. Tien venis unu el la aktoroj kaj poste alia por ludi parton de la tuta teatraøo. Nia amiko Felikso

